# ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ◆ Esperantobladet ◆ joulukuu ◆ decembro ◆ 6/2003



*La partoprenantoj estis prezentitaj de kunparolanto en la trejnseminario. Jen Henry Heinonen kun la A3-afiŝo farita pri li kun desegnaĵo kaj respondoj notitaj de la kunparolanto. Artikolo pri la seminario sur p. 5-7.* (Foto: Pentti Makkonen)

## Osmo Buller denove Ĝenerala Direktoro, p. 4

**Oulun juhlaseminaari, s. 8 ◆ Kunvojaĝo al Pekino, p. 14**

# ESPERANTOLEHTI

## Esperanta Finnlando ◆ Esperantobladet ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen aikakauslehti. Suomen esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.
Språkpolitisk tidskrift. Organ för Finlands Esperantoförbund.
Lingvopolitika periodaĵo. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.
Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.
Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.
Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

**Toimitus/Redaktion/Redaktejo**: 💻 eaflehti@esperanto.fi
Päätoimittajaa etsitään, yhteydenotot puheenjohtajalle (Anna Ritamäki, yhteystiedot alla)
Ĉefredaktoro serĉata, kontaktu la prezidanton (Anna Ritamäki, kontaktinformoj sube)
Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*
Mannerheimintie 40 D 86, 00100 Helsinki. ☎ (09) 587 6738 💻 ilkka.santtila@esperanto.fi

**Tilaushinta/Prenumerationspris/Abonprezo:** 15 e/vuosi/år/jaro;
Jäsenille/ För medlemmar/ Por membroj: 10 e; aliaj landoj 13,50 e.

**Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:**
Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538 💻 eaf@esperanto.fi
Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.
Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800017-230825.

Julkaisija/utgivare/eldonanto: Suomen Esperantoliitto – Esperanto-Asocio de Finnlando.
Painosmäärä/Eldonkvanto: 400

## Esperanto-Asocio de Finnlando ◆ Suomen Esperantoliitto

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

**Prezidanto/Puheenjohtaja:** *Anna Ritamäki*
Dragsfjärdsvägen 690, 25700 Kimito. ☎ (02) 423 146 📠 (02) 423 246 💻 anna.ritamaki@kolumbus.fi
**Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja:** *Päivi Saarinen*
Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 💻 paivi.saarinen@iki.fi
**Sekretario/Sihteeri:** *Tiina Oittinen*
Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 💻 tiina.oittinen@pp.inet.fi

**Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet:**
*Eila Martin*, Intiönpolku 4 as. 36, 90100 Oulu. ☎ (08) 374 697
*Synnöve Mynttinen*, Koskenniskantie 5 D 39, 48400 Kotka. ☎ (05) 260 1326
*Jukka Noponen*, Viipurinkatu 27 A 12, 00520 Helsinki. ☎ (040) 5915767 ☎📠 (09) 1483871 💻 jukka.noponen@iki.fi
*Markku Saastamoinen*, Siukolantie 9 H 12, 33470 Ylöjärvi. ☎ (03) 348 4245 💻 markku.saastamoinen@jippii.fi

**Vicestraranoj/Varajäsenet:**
*Raita Pyhälä*, Jykyrintie 3, 69440 Lestijärvi. ☎ (06) 863 7351 💻 saliko@kase.fi
*Eero Rinta-Karjanmaa*, Poppelikatu 11-13 A 24, 15520 Lahti. ☎ (03) 783 4448
*Tuomo Grundström*, Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ (050) 5180 590, (02) 822 7779 💻 tgrundstrom@www.lailanet.fi

**Kasisto/Rahastonhoitaja:** *Anna-Liisa Heikkinen*
Asiakkaankatu 2 G, 00930 Helsinki. ☎ (09) 343 1449 💻 eafkasisto@esperanto.fi
Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800017-230825.

**Oficejo/Toimisto:** Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.
☎ (09) 715 538 (puh.vastaaja/aŭtomata respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

**Ĉefdelegito de UEA/ UEA:n pääedustaja:** *Heta Kesälä*
Kalamiehenkuja 3 D 32, 04300 Tuusula. ☎📠 (09) 275 5528
Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800029-19438647 (maksut UEA:lle/ pagoj por UEA).

**Internet**: http://www.esperanto.fi

# De lingvo al ideologio kun amuzo

En la antaŭa numero mi skribis pri la kialoj por eklerni esperanton kaj resti en la movado surbaze de respondoj dum Aŭtunaj Tagoj en Raŭmo. Samtempe la nova norvega esperantoprezidanto Jardar Eggesbø Abrahamsen faris enketon pri la sama temo en la reto. Ĝi surprize simile respegulas la situacion, sed tamen aliras la demandojn alimaniere, havas alian konsiston de la respondantaro kaj ankaŭ montras respondojn de multe pli da homoj. La norvega enketo donas novan okazon por pripenso.

La plej grava kialo por eklerni estis la intereso pri la lingvo mem dum por plua okupiĝo tiu kialo iĝis la malplej grava. Amikoj kaj amuzo estis la malplej ofta ĉefa kialo por eklerno dum ĝi atingas la duan lokon ĉe la plua okupiĝo. Ideologio aŭ politiko tamen plej gravis por multaj, por preskaŭ triono, jam de komenco, kaj tiu flanko plifortiĝis kun la tempo tiom ke ĝi estis la klare plej grava kialo por plua okupiĝo.

Ni povas supozi ke la trovitaj geamikoj kaj la bonaj spertoj pere de esperanto fortigis ankaŭ la ideologian flankon ĉe la plej multaj. Evidente estas ankaŭ ke la lingvo mem rolas gravan rolon por ke entute eblu tiuj amikaj kontaktoj kaj la necesaj pensinterŝanĝoj pri ideologiaj kaj politikaj temoj. Kvankam ja eblas konsideri sin esperantisto kaj forte propagandi la lingvon sen scii la lingvon, ni povas supozi ke tiuj personoj ne trovis la enketon (anoncitan esperantlingva en kelkaj retlistoj por aktivuloj).

Por ke oni faru la penon komenci lerni lingvon kutime necesas ĝuste lingva intereso, dum kiam oni jam ĝin scias sufiĉe por ĝin uzi, tiu flanko iĝas jam evidenta kaj eblas koncentriĝi pri la praktikado kaj samtempe evoluigi la pensan flankon de la engaĝiĝo. Mi pensas ke eblas resumi la enketon per la sekva frazo: Tipa vojo de esperantisto iras de lingva intereso per la kresko de internacia amikeco al ideologia engaĝiĝo.

Ĝenerale ŝajnas al mi ke ni emas iom tro subtaksi la ideologian flankon, aŭ preferinde, la idealisman flankon de la engaĝiĝo. Idealismo ne egalas fanatikismon aŭ malatenton al homaj kontaktoj kaj kvalito. Idealisma sinteno ne nepre egalas al publika manifestado en formo konvinkoprovoj al neesperantistoj. Povas temi pri sinteno kiu manifestiĝas kiel konkretaj agoj, ekzemple en simplaj amikaj babiloj pri bazaj interhomaj temoj.

Notindas ankaŭ ke la respondantoj al la enketo averaĝe sciis multajn lingvojn. Supozeble la esperantistoj ofte havas intereson pri lingvoj antaŭ eklerno kaj ni ja ankaŭ scias ke la uzo de esperanto mem ofte instigas al lernado de pliaj. Mi ▷

La enketo demandis, unue, pri la ĉefa kialo lerni la lingvon. Estis prezentitaj tri alternativoj: ◆ Ĉu estis pro ideologio/politiko aŭ simile? ◆ Ĉu ĉar vin interesis la lingvo mem? ◆ Ĉu pro amikoj, amuzo ktp.? Due, ĝi demandis pri la ĉefa kialo ankoraŭ okupiĝi pri esperanto kaj donis la samajn tri alternativojn.

Jen la statistiko: ◆ 280 respondantoj ◆ aĝa vario inter 80 kaj 15, inter la respondantoj interalie 20 % naskiĝis en la 60aj, 20 % en la 70aj kaj 11 % en la 80aj, averaĝa naskiĝjaro 1944 ◆ de 45 landoj (16 norvegoj) ◆ parolas averaĝe 2,9 lingvojn krom esperanton kaj la gepatran.

1. Kio estis via *ĉefa* kialo por lerni Esperanton? 271 respondoj dividitaj jene: ◆ Ideologio/politiko: 31.73 % (86) ◆ La lingvo mem: 49.07 % (133) ◆ Amikoj, amuzo: 19.18 % (52).

2. Kaj kio estas nun via ĉefa kialo por ankoraŭ okupiĝi pri Esperanto? 272 respondoj dividitaj jene: ◆ Ideologio/politiko: 45.58 % (124) ◆ La lingvo mem: 17.64 % (48) ◆ Amikoj, amuzo: 36.76 % (100).

Multaj komentis ke ili havis plurajn aŭ aliajn kialojn kaj ke ili pro tio ne estis kontentaj pri la enketo.

# Nomumo de la nova Ĝenerala Direktoro de UEA

Hieraŭ, la 22-an de decembro, la estraro de UEA nomumis Ĝenerala Direktoro s-ron **Osmo Buller**. Al multaj legantoj la nomo estas konata. Temas pri la homo, kiu ĝis 2002 estis la Ĝenerala Direktoro de UEA.

Osmo Buller, kiu antau du jaroj preferis alian laborlokon, nun estis inter la kandidatoj por la posteno de Ĝenerala Direktoro. Li daŭre sentas sin kun-respondeca pri la bonfarto de la Esperanto-movado kaj tute aparte de Universala Esperanto-Asocio. Cetere li agnoskas, ke kun la nuna estraro ja li povas kunlabori.

Neniam estis veraj malkonsentoj pri la ĝenerala linio de la Asocio, kaj ĉiuj koncernatoj fakte harmonie kunlaboris pri la preparado kaj efektivigo de la antaŭa Kampanjo 2000 kaj de la nuna laborplano. Kaj la estraro kaj la nova Ĝenerala Direktoro agnoskas, ke la pasinteco estas konsiderinda fermita kaj la situacio de ĝenerala interkonsento en UEA povas esti konsiderata reakirita.

Kandidatiĝis por la funkcio de Ĝenerala Direktoro kelkaj personoj kaj estis kontaktoj kun potencialaj kandidatoj kaj el okcidenteŭropaj landoj kaj el landoj ekster Eŭropo. La estraro ekzamenis la kvalifikojn de ĉiuj kandidatoj kaj ankaŭ la personan situacion, tute aparte en la kazoj de bezonataj labor-permesoj en Nederlando.

La estraro agnoskas ke Osmo Buller havas plurjaran sperton pri la proceduroj de la Centra Oficejo. Kvankam en la lastaj du jaroj la procedo de modernigo de kelkaj fakoj en la oficejo kaj en la funkciado de la estraro mem kuntrenis modifojn kaj pliajn automatigojn, la novelektita Ĝenerala Direktoro povos facile daŭrigi tiun proceDon.

La estraro fidas la promeson de Osmo Buller plene sin dediĉi al harmonia organiza laboro kaj al senkondiĉa antaŭenigo de UEA kaj la Esperanto-movado.

*Por la estraro:*

*La estrarano pri financo kaj administrado*
*Ans Bakker ten-Hagen*

*La prezidanto*
*Renato Corsetti*

*GK de UEA, n-ro 173 2003-12-23*

---

▷ tamen kredas ke alia respondantaro donus pli malaltan rezulton, ke eble inter niaj AT-partoprenintoj la averaĝa kvanto de lingvoj estus iom malpli alta.

Ĉu iu emus fari vere sciencan enketon pri la anoj de Esperanto-Asocio de Finnlando? Ekzistas ankaŭ malnovaj studetoj utiligeblaj, ekzemple tiu farita por la edukministrejo en la 80aj jaroj. Mi kredas ke por tia esplora projekto, se kondukita de kompetenta studento aŭ profesiulo, eblus trovi ne nur moralan subtenon sed ankaŭ financan. Krome Esperanta Finnlando volonte publikigas viajn tute nesciencajn komentojn.

*Viaj reagoj estas bonvenaj salutas*
*via prezidantino Anna Margareta*

PS. La projekta grupo de Al kvalita komunikado kunsidos sekvafoje sabate la 17an de januaro por taksi la ĝisnunajn rezultojn kaj plani por la estonto. Ni jam ricevis ideojn kaj komentojn, sed vi estas bonvena komuniki pliajn pensojn kaj – ankaŭ – rememorigi nin pri malnovaj ideoj. Aparte ni petas vin komuniki viajn trejnbezonojn: kiaj trejnkursoj interesus vin? Por bone kunteni la fadenojn ni bezonas konstruan kritikon. Tre gravas engaĝigitaj membroj.

# Eroj de la trejnseminario por pli kvalita komunikado

La unua trejnseminario de la projekto Al kvalita komunikado okazis en la kristana instituto de Jyväskylä (Jyväskylän kristillinen opisto) inter la 4a kaj 5a de oktobro 2004. Jen kelkaj eroj surbaze de la notoj kompilitaj de Päivi Saarinen por la oficiala memorando, kiu restos labordokumento por plia evoluigo de nia informa agado. La tekston por la gazeto redaktis Anna Ritamäki.

### Ek al studronda agado!

Ni komencis, post bona manĝo en la instituta manĝejo, la seminarion per praktikaj konsiloj de ekstera spertulo, Keijo Tuunanen de OK-opintokeskus (aŭ Opintotoiminnan keskusliitto). Tiel ni celis inspiri al pli kvalita agado, kiu povas temi ne nur pri informado, sed ankaŭ pri simpla esperantolernado aŭ alia esperantoligita aktiveco.

Keijo Tuunanen de OK-opintokeskus prezentis kiel ni povas agadi pere de opintokerho-subvencioj, do ricevi ŝtatajn subvenciojn por studrondoj (oficiale studkluboj). Tuunanen ne nur klarigis kiel plenigi la oficialajn dokumentojn – ne estas malfacile! – sed ankaŭ povis doni al ni ĝojan novaĵon: Esperanto-studrondoj estas ĝis la fino de la jaro 2004 erikoiskerho-rondoj (havas statuson de specialaj studkluboj), do ricevas ne ĝis 3 eŭrojn por studhoro (45 min.) sed 5 eŭrojn. Necesas nur pruvi kostojn por la aktiveco, ekz. por kopioj, lernolibroj kaj alia materialo.

Pliajn informojn donas partoprenantoj de la seminario, funkciuloj de la landa asocio kaj la OK-opintokeskus, ekzemple en reta adreso *www.okry.fi*, kie troviĝas ankaŭ la bezonataj formularoj. Iuj kluboj jam utiligas la studrondajn subvenciojn, sed povus utiligi ilin pli. Iuj kluboj konsideras sian agadon tro modesta, kvankam ĝi reale bone taŭgas. Krome eblas ja formi novajn grupojn dank al la subvencio. Ni eluzu la ŝancojn!



***La unuan trejnseminarion de la projekto Al kvalita komunikado partoprenis 22 personoj de ĉiuj aktivaj aĝgrupoj kaj preskaŭ ĉiuj membrosocietoj de EAF.***

## Pri ni – la aktivuloj, asocioj kaj agadoj

La trejniĝo daŭris per trakto de ni mem, ni kiel aktivuloj kaj ni kiel asocioj. Konante nin mem ni pli bone povas komuniki pri ni mem, sed krome ni ankaŭ pli bone povas plibonigi nian agadon ĝenerale.

La interkonatiĝa parto okazis diskutante en duopoj pri aferoj kiel la familio, la historio kaj la plej ŝatataj aferoj en esperantujo, la signifon de kvalito en komunikado. La formularojn kiujn oni samtempe plenumis poste pendis sur la muro por la aliaj legi.

La partoprenantoj trarigardis la statutojn de siaj asocioj por analizi kiel en diversaj asocioj estas difinita la celo de la agado. Krome ni diskutis kial indas havi asociojn. Por konkretigi la konon de niaj asocioj la partoprenantoj analizis la bazajn funkciojn de sia asocio surbaze de la 14 mezurindikiloj ellaboritaj de Svenska studieförbundet (svedlingva ekvivalento de OK-opintokeskus) kaj prezentitaj en la libro Föreningskompassen.

Laŭ la analizo evidentiĝis ke la fortoj de niaj asocioj estas bone prizorgitaj membroregistroj, kunvenaj dokumentoj kaj informado al membroj, oftaj neformalaj renkontiĝoj kaj flua kunlaboro kun aliaj. La plej gravaj malfortoj estas en financado de la agado, varbado de membroj kaj funkciado de laborgrupoj.


## Revene al informa seminario 1999

EAF okazigis en 1999 informan seminarion. Tiam temis pri laborkunsido en kiu estis formulitaj konkretaj proponoj. Nun ni reiris al la tiam produktita raporto por rekapti tiamajn pensojn kaj por taksi ĉu la tiamaj proponoj estas realigitaj.

Laŭ la resumo de la tiama seminario EAF strebas en sia informa agado al :

– disvastigo de la konateco de esperanto
– konstruo de pozitiva imago ĉe la publiko
– pli aktiva partopreno en lingvopolitika diskuto
– kreo de rutinoj por interna informado

El la proponoj realiĝis preparado de la “unua” informilo, kiu plej allogus la interkonsentitan celgrupon de homoj en aĝoj de 15-45 jaroj (la informilo *Rakastu esperantoksi*). Estis proponita tuta serio de informiloj laŭ samlinia ekstera




***Slipetoj kun vizioj kaj timoj trovas siajn lokojn en skalo de dezirindeco kaj verŝajneco, de maldekstre Anna Ritamäki, Marketta Laamanen, Markku Saastamoinen kaj Jukka Pietiläinen.*** *(Fotoj de seminario: Pentti Makkonen)*

aspekto, sed tio ankoraŭ restas realigota.

Grupo de specialistoj por komenti kaj reagi al diversaj esperantorilataj demandoj poste ne funkciis kaj same okazis kun grupo kies celo estis novaĵtipa informado pri esperanto al amaskomunikiloj. Gazetaraj komunikoj tamen estas senditaj pli regule okaze de jaraj aranĝoj ks. Libroservo ene de EAF funkcias nuntempe malgrandskale kiel interkonsentite en la seminario. Plie estis interkonsentite la aperritmo de Esperantolehti kaj kutimaj eroj en la ses jaraj numeroj. Tion la gazeto sekvas, kvankam numeroj foje iom malfruas.

### Kiel komuniki kvalite?

La programo de dimanĉo komenciĝis per prezento de la projekto Al kvalita komunikado. La partoprenantoj konatiĝis kun la ideoj malantaŭ la projekto kaj kun la ĝisnunaj realigaĵoj kaj planoj.

La partoprenantoj analizis diversspecajn artikolojn aperintajn pri esperanto kaj pripensis kio rezultigis ilian aperon kaj enhavon. Ofte la kaŭzo de la apero estas iu novaĵo, t.e. ekspozicio, okazanta evento, interesa loko aŭ ekzemplo de kurso. Aferoj de lokaj homoj interesas lokajn gazetojn kaj bone taŭgas al iliaj artikoloj. Informo pri estonta evento gravas.

Esperantistoj mem povas atingi publikecon plej bone per rektaj reagoj. Esperantistoj ankaŭ foje povas mem verki artikolojn. Malgrandaj anoncoj kiel en iu kalendaro de eventoj ankaŭ povas rezultigi al kontakto por artikolo. Foje ankaŭ videblas en la artikolo surbaze de kies kaj kiaj informoj ĝi estis verkita. La partoprenantoj diskutis ankaŭ la signifon de tio ĉu la informoj en la artikolo estas korektaj aŭ malkorektaj, ĉu pozitivaj aŭ negativaj.

### Publikaj rilatoj

Estis traktita la koncepto ”publikaj rilatoj”, kies celo estas konateco kaj prestiĝo por krei al esperanto kaj la agado bonan imagon, bonan publikan bildon. Por bone prizorgi publikajn rilatojn esperantistoj povus utiligi ekzemple

– okazigon de premiokonkurso aŭ nomumon de homojn al diversaj pozicioj

– okazigon de tema tago aŭ seminario

– (simpatiajn) ambasadorojn, ‘manekenojn’

– simpatiajn manierojn agi pri/por la afero, interesa aŭ eksterordinara aliro

– ZEO:jn

Por atingi publikecon inter aliaj asocioj kaj la ĝenerala publiko, sed ankaŭ en amaskomunikiloj (gazetaro, radio, televido) ekzistas pluraj manieroj, ekz. foiroj, ekspozicioj kaj publikaj eventoj (ankaŭ organizi mem aŭ kune kun aliaj), vizitoj kaj prelegoj. Prelegantoj kiel personoj estas interesaj. Oni povus diri ke necesas “preteksto” por ke la amaskomunikiloj publikigu ion kiel novaĵon aŭ mem faru artikolon. Inter bezonataj iloj estas menciitaj videoj, informiloj, diapozitivaj serioj kaj interreto.

### Vizioj kaj timoj

Fine la partoprenantoj imagis bonan kaj malbonan staton de publikaj aferoj rilatantaj al esperanto post dek jaroj kaj pripensis ĉu tia evoluo estus dezirinda aŭ nedezirinda kaj kiugrade. La rezultinta analizo estos konservita en la oficejo por dek jaroj por tiamaj esperantistoj miri.

### La partoprenantoj

Jen la listo de personoj partoprenintaj la seminarion: Anna-Liisa Ali-Simola (Turku), Anna-Liisa Heikkinen (Helsinki), Henry Heinonen (Helsinki), Taneli Huuskonen (Helsinki), Sylvia Hämäläinen (Tampere), Risto Jämsen (Jyväskylä), Kari Kettunen (Jyväskylä), Seija Kettunen (Jyväskylä), Marketta Laamanen (Mikkeli), Pentti Makkonen (Jyväskylä), Mikko Mäkitalo (Turku), Paula Niinikorpi (Rauma), Jukka Noponen (Helsinki), Tiina Oittinen (Turku), Jukka Pietiläinen (Tampere), Timo Pirinen (Porvoo), Matti Pyhälä (Lestijärvi), Raita Pyhälä (Lestijärvi), Anna Ritamäki (Kimito), Päivi Saarinen (Espoo), Markku Saastamoinen (Tampere), Tuula Virolainen (Espoo). Esperantistoj de Jyväskylä helpis pri pluraj praktikaĵoj.

# Pietiläinen ja Buller Oulun seminaarissa

Mikä on maailman erikoislaatuisin kirjallisuus? Olisiko hyvä vastaus sellainen, että kirjallisuus, jolla on yli 100-vuotinen historia, runsaasti tekijänimiä ja suuri teosten lukumäärä, mutta jota kukaan ei ole koskaan kirjoittanut äidinkielellään? Siis esperantonkielinen kirjallisuus.

Tällä lainauksella, joka on peräisin Simopekka Virkkulan artikkelista (Aamulehti 12.9.1987) aloitti tohtori Jukka Pietiläinen ansiokkaan alustuksensa Oulun Esperantoseuran 25-vuotisjuhlaseminaarissa 8.11. Oulun pääkirjastossa. Pietiläinen kuitenkin huomautti, että Virkkulan väite ei täysin pidä paikkaansa, sillä jotkut esperantoa äidinkielenään puhuvat ovat luoneet esperantonkielisiä teoksia (esim. brasilialainen Sara Larbar).

– Esperanton luoja L. Zamenhof oli myös runoilija ja kääntäjä. Hän loi myös e-kirjallisuuden, mutta hänen roolinsa, voisi sanoa onneksi, ei muodostunut keskeiseksi, sillä kirjallisuuden soihtua ovat kantaneet monet henkilöt useissa eri maissa. Esperanto kehittyikin kirjallisuuden ja alkuvaiheessa erityisesti runouden kieleksi. Tämä lienee yksi tärkeimmistä tekijöistä siinä, että esperanto päihitti kilpailijansa ja joiden vuoksi tänäänkin ihmiset puhuvat esperantoa ja ovat siitä kiinnostuneita.

Pietiläisen arvion mukaan monet arvostavat esperantokirjallisuutta sen humanististen ja kansainvälisten arvojen vuoksi, sillä juuri kansainvälisyys ja maailmanlaajuisuus ovat lähimpänä esperantokirjallisuutta.

Esperantokirjallisuus voidaan ajallisesti jakaa neljään kauteen. Ensimmäinen oli naivin romanttinen kausi. Sitä seurasi runouden ja kirjallisuuden laajenemisen aika. Kolmanteen kauteen sisältyi maailmansotien välissä esperanton vainot. Sitä voisi luonnehtia pysähtyneisyyden kaudeksi, mutta myös kypsyminen ajaksi. Sen sijaan neljäs kausi, viimeisimmät vuosikymmenet, on ollut erityisesti romaanin kypsymisen kautta. Kirjallisuus on monipuolistunut ja kustantajia löytyy eri puolilta maailmaa.

Pietiläinen sanoi alkaneensa opiskella esperantoa muista kuin kirjallisista syistä. Kieltä opittuaan e-kirjallisuus alkoi kiehtoa häntä enemmän ja enemmän. – Kun luen englannin tai venäjänkielistä tekstiä, joita hallitsen suhteellisen hyvin, tunnen lukevani vierasta kieltä, mutta esperantossa on kyse enemmän minun kielestäni, sanoi Jukka Pietiläinen.

### 15 vuotta maailmalla

Juhlaseminaarissa Osmo Buller kertoi kokemuksistaan kansainvälisessä työyhteisössä. Kuten esperantistit tietävät, Buller työskenteli pitkään (15 vuotta) Esperanton Maailmanliitossa Rotterdamissa.

– Minkäänlaista kulttuurishokkia en voi sanoa kokeneeni Hollannissa, sillä suomalaisen on helppo sopeutua alankomaiseen elämänmenoon. Hollanti on kulttuurillisesti lähempänä Pohjoismaita kuin Hollannin eteläinen naapuri Belgia. Ehkä osasyynä tähän on se, että Belgia on katolinen maa. Sekään ei selitä kaikkea, sillä myös Hollannin eteläosassa valtauskontona on katolilaisuus. Silti alue ei juuri poikkea kulttuurinsa osalta muusta Hollannista.

Kansainvälisten kongressien valmisteluissa jouduin matkustamaan eri puolille maailmaa. Kansojen tavat, perinteet ja suhtautuminen sopimuksiin vaihteli tavattomasti. Tässä suhteessa ääripäitä olivat Kiina, Saksa ja Espanja.

Huomasin Augsburgin ja Berliinin kongressien valmistelujen yhteydessä, että saksalaisten kanssa piti asiat panna pikkutarkasti paperille ettei tule vaikeuksia.

Pekingissä vuonna 1986 järjestetyn kongres-



*Oulun Esperanto-seuran juhlaseminaarissa luennoivat Jukka Pietiläinen (oik.) ja Osmo Buller.*

sin järjestelyt olivat vielä mieliin painuvimmat. Joka kerta kun kysyimme missä vaiheessa valmistelut ovat, vastattiin aina vain, että puolue ja hallitus ovat päättäneet että kaikki onnistuu. Niin muuten onnistuikin! Silloin Kiinassa ei vielä ollut kokemusta kansainvälisistä kongresseista. Tuohon aikaan puolue ja hallitus vastasivat rahoituksesta. Ensi kesän Pekingin kongressin osalta tilanne on aivan toisenlainen myös rahoituksen osalta.

Valenciassa taas ei oltu turhan tarkkoja asioiden paperille kirjaamisessa. Valmistelut vaikuttivat vähän siltä ja tältä. Mutta heillä on ilmiömäinen kyky inspiroida, kuten yleensäkin Etelä-Euroopassa ja latinalaisissa maissa. Kongressi oli menestys.

Pohjoismaita ei turhaan kehuta kansainvälisten tapahtumien järjestäjänä. Työtoveri Nikola Rasiæsanoikin, että hermojen lepuuttamisen takia kongressi pitäisi järjestää joka viides vuosi Pohjoismaissa.

Koska UEA:n työntekijät ovat poikkeuksetta olleet eurooppalaisia ja amerikkalaisia, halusin tasapainottaa tilannetta siten, että ainakin ns. vapaaehtoistyöntekijät, jotka työskentelevät UEA:ssa lyhyitä jaksoja, tulevat Euroopan ulkopuolelta. Pian huomasin, että monille aasialaisille ja afrikkalaisille johtaja on seuraava Jumalasta. Jos kysyin heiltä neuvoa, he menivät tyystin lukkoon: ”Eikö johtaja tiedäkään”, heidän ilmeensä kertoi.

Myös kasvojen menettäminen koetaan monissa Aasian ja Afrikan maissa häpeällisenä. Ihmistä ei saa moittia julkisesti. Muistiini jäi, että Etelä-Koreassa tälle oli oma koreankielinen sana ”kipu”, totesi Osmo Buller.

### Esperantolle julkisuutta

Oulun Esperantoseuran juhlaseminaari, joka liittyi osana Suomen Esperantoliiton Laatua viestintään -projektiin, sai suhteellisen paljon julkisuutta. Radio Pooki haastatteli seuran puheenjohtajaa Erkki Röntystä. Oulu-Radio (Yle) puolestaan haastatteli Osmo Bulleria. Ennakkoon seminaarista kertoi sanomalehti Kansan Tahto, jonka levikkialueena on Pohjois-Suomi. Jälkeenpäin seuran 25-vuotispäivästä uutisoi Oulussa ja sen ympäristössä joka kotiin jaettava Forum24. Lisäksi Kansan Tahto julkaisi Erkki Röntysen laatiman laajan artikkelin, joka perustui Osmo Bullerin alustukseen.

*(E.R)*


# Francaj ”Aŭtunaj Tagoj”

Francaj geamikoj invitis Salikon por prelegi pri Finnlando dum la 15a Nordfranca Eŭropa Esperanto-Rendevuo 8.-9.11.2003. Estis interese kompari la tieajn programon kaj ejojn kun niaj finnaj Esperanto-renkontiĝoj.

La kunvenejo “Morbecque” situis en tre kvieta kampara vilaĝeto, for de vendejoj, restoracioj kaj amuzejoj. Ĝi estas edukejo pri naturo kaj medio por lernejanoj, kiuj – eĉ se tre junaj – vizitadas ĝin kun siaj geinstruistoj. Ili tranoktas surloke. Haveblas du- kaj plurlitaj tre modestaj ĉambroj kun lavkuvo; duŝoj kaj necesejoj en koridoro. Troveblas manĝejoj kun tablaro kaj seĝaro por etuloj kaj plenkreskuloj. Propran viŝtukon ni devis kunporti kaj niajn litojn ni mem pretigis. Malantaŭ la grandaj fenestroj de unu manĝejo paŝtis sin bovinoj. Nur pikdrato kaj unu metron larĝa verda herbejo malhelpis la bovinojn veni leki la vitregojn.

En la apuda arbaro krakadis pafoj de ĉasistoj, kaj arbarrande staris tabuleto avertanta pri danĝero. Foliarboj, precipe fagoj, surhavis siajn belajn aŭtunajn kolorojn: kupro, flavo. Iom post iom venis la aliĝintoj, entute pli ol 90 esperantistoj, duono el ili el Belgio. Ni ekkafumas kaj interparolas neformale, starante en nek formalaj nek konstantaj grupoj. Multaj jam konas unuj la aliajn. Ne estas nomŝildoj aŭ listo pri la partoprenantoj.

Ni dividiĝas en 4 grupojn: komencantoj, progresantoj, praktikantoj, spertuloj. La du laste menciitaj grupoj estas la plej grandaj, po trideko da personoj. La komencanta grupo estas la plej malgranda, kaj la aĝoj tie varias de 6 al 60 jaroj. La instruantoj uzas tekstojn, kantojn, poemojn, ekzercojn, bildojn, ĉiu laŭ sia maniero kaj laŭ la nivelo de la grupo. La spertula grupo elektas temojn por sia konversacio: Esperanto-renkont-



***Laurent kaj Gudule kun Richard Valet (maldekstre), unu el la organizantoj de Esperanto-rendevuoj.*** *(Fotoj: Saliko)*




iĝejoj, kursoj, libroj, gazetoj, ĉies plej (mal)agrablaj travivaĵoj en Esperantujo, interesaj renkontitoj, vojaĝoj. Fakte ni devus aŭskulti prelegon de George Lagrange (ĵorĵ lagraĵ) pri la ŝanĝiĝo de la lingvo dum lia 50-jara esperantisteco, sed li grave malsaniĝis ĝuste antaŭ la rendevuo kaj la anstataŭanto devas kontentigi la grupon preskaŭ improvize. Bone li zorgas, ke plejeble multaj havu siajn parolvicojn sed ne tro longajn. En 30-persona grupo de fluaj parolemuloj tio ne facilas. Indus dividi la grupegon en du partojn, sed bezonatus plia gvidanto.

La manĝoj estas bonaj, longdaŭraj kaj bruEGaj. (La pladoj de la vegetaranoj ŝajnas malpli indaj, kvazaŭ la kuiristinoj ne scius, kion doni se ne viandon.) Bier- kaj vinboteloj, akvokruĉoj, fromaĝoj, ŝercado en E-to kaj la franca. La apuda libroservo ĉiam uzeblas. Valora stoko da novaj eldonaĵoj kaj brokantaĵoj. Infanoj ludas sub kaj inter la tabloj. Ne ĉiam la reala horaro kongruas kun la planita.

Vespere je la naŭa komenciĝas ”diaporamo” pri Finnlando. Saliko montras centon da lumbildoj kaj rakontas pri la lando kaj vivo eksterurba. La ĉeestantoj ŝajnas kontentaj, havas demandojn, kelkaj proponas, ke mi venu ankaŭ al iliaj urboj por montri la samon dum turneo en Nederlando, Belgio, (norda) Francio. Finnlando al ili aspektas ekzotike.

Ni sciiĝas pri la laboro por onta kongreso en Bulonjo-sur-Maro, okazonta dumpaske en 2005, por marki la centan datrevenon de la Unua Universala Kongreso. La urbo Boulogne-sur-Mer tre favore akceptas la esperantistojn. La programo estas jam decidita, kaj ĉiaj informoj troveblas en Interreto, vd. *http://boulogne2005.online.fr*

Fine de la dua tago juna familio Gudule kaj Laurent kun siaj infanoj Lola kaj Romain rakontas pri sia kvinjara vagado per ruldomo tirata de la ĉevalino Kamila tra okcidenta Eŭropo norden kaj tra orienta Eŭropo suden. (La unuan vintron ili pasigis en Svedio kaj ne vizitis Finnlandon.) Komence de la vojaĝo Lola estis nur bebo kaj dumvojaĝe naskiĝis Romain. La gepatroj fotis ĉ. 3000 lumbildojn, el kiuj ili nun montras ducent. Laŭ ili Rumanio estas la plej bela kaj interesa lando. Min interesis ĉiuj orienteŭropaj landoj, ĉar malpli konataj kaj ĉar la tiea vivo, kvankam malriĉa, ŝajnas simpla, homa, natura. Aldone Laurent montras videofilmeton pri la grekia-italia-francia fino de la vagada aventuro. Aŭdeblas la malrapida ritma batado de la hufoj. Almenaŭ unu el la gepatroj kutime piediris antaŭ la ĉevalino. La spektintoj metas multajn demandojn. Laurent povas rakonti pri la vojaĝo en 3 lingvoj: Esperanto, franca, angla.

La tuta aranĝo kun 2 varmaj manĝoj, matenmanĝo, tranokto, kursoj kaj distra programo kostis 48 eŭrojn, partopreno sen manĝoj kaj tranokto 10 eŭrojn, unutaga partopreno 24 eŭrojn. Multaj venis per propraj aŭtoj, veturigante tiujn, kiuj ne havas aŭton. Fervojaj stacioj situis kelkajn kilometrojn for. Ĉiuj ŝajnis profiti kaj kontenti malgraŭ la nebula, malvarmeta vetero kaj la modesta, simpla kunvenejo. Post unu jaro ili supozeble havos sian 16an rendevuon samloke.

*Saliko*

# Jaroslav Vorobjov venkis en fabelkonkurso

La literatura kaj kultura centro Päätalo-instituto kaj Vilaĝa Asocio de Metsäkylä en Taivalkoski, Finnlando, organizis ĉi-jare por la kvara fojo fabelkonkurson en Esperanto por infanoj 6-13 -jaraj. Ĝiaj rezultoj estis anoncitaj la 18-an de oktobro samtempe kun tiuj de la fabelkonkurso por finnaj lernejanoj, kiun Päätalo-instituto organizas ĉiujare ekde 1993. La rezultojn anoncis s-ino Aini Vääräniemi, prezidantino de la Vilaĝa Asocio. Etaj Esperanto-lernantoj de Metsäkylä kantis en la festa aranĝo kaj kantigis ankaŭ la publikon en Esperanto.

La Esperanto-konkurso allogis 14 fabelojn el ok landoj, t.e. same multe kiel en 2002. Ili estis prijuĝitaj de ĵurio, en kiu membris s-inoj Sylvia Hämäläinen, Anja Karkiainen kaj Raita Pyhälä (Saliko). La ĉefan premion, ”Fabelo Internacia”, gajnis **Jaroslav Vorobjov** el Ruslando, laŭreato de la 1-a premio en la aĝgrupo de 11-13-jaruloj, pro sia fabelo ”Ljapiklando kaj ties loĝantoj ljapikoj”.

## Premioj:

Kat. A (ĝis 9-jaraj):
1. Alina Calibe Bruegger (Germanio) pro “La floreto”;
2. Larissa Bister (Finnlando) pro “La aventuro de formiko”;
3. Francesco Bentigvoli (Italio) pro “Pupo por amiko” kaj Klara Delarasse (Francio) pro “Kuniklo kun knabino”.

Kat. B (10-11-jaraj):
1. Hajnal MacGill (Hungario) pro ”Surikato en Usono”.

Kat. C (12-13-jaraj):
1. Jaroslav Vorobjov (Ruslando) pro ”Ljapiklando kaj ties loĝantoj ljapikoj”;
2. Paolo Pezzi (Italio) pro ”La lando de la pano” kaj Silvio Ravaioli (Italio) pro ”Filipo”;
3. Laura Ziegelmueller (Svislando) pro ”Ĵinja”.

Grupoj:
1. Grupo el Ecole de la Grande Ourse (Svislando) pro “Amo sen limo”;
2. Grupo “Amiketoj de Kolibridoj” (Kubo) pro “Feĉjo la kapreolo”;
3. Ivan Gandolfo kaj Martin Haldemann (Svislando) pro “Marcel”.

*Larissa Bister*

**La Aventuro de For-Miko**

Tutmonda Fabelkonkurso 2003, kategorio B, 2a premio

En arbaro estis formikejo. Ĝi estis du metrojn alta. Tie loĝis miloj da formikoj. Unu formiko nomiĝis For-Miko. For-Miko ne volis loĝi en formikejo. Li volis ĉi-i kie loĝas la homoj. Tial, kiam malgranda knabineto preterpasis, For-Miko saltis sur ŝian piedon. “Tre amuze”, diris For-Miko. Sed jam post unu minuto For-Miko sentis naŭzon. “Nun mi vomas”, li diris kaj vomis. “Finfine mi estas antaŭ la pordo de la homejo”, diris For-Miko kaj saltis de la piedo. “Mi iras unu metron antaŭen”, For-Miko diris. “Mi vidas nun iomete. Mi devas iri ankoraŭ iomete.” Post kiam For-Miko iris dek metrojn antaŭen, li vidis la tutan domon. Ĝi estis tiom granda, ke For-Miko ektremis kaj ekkuris. For-Miko kuris ĝis la formikejo, kaj ĉiam volis loĝi tie.

# Eŭropa Bunto

Eŭropa Unio dum 2004 kreskas de 15 al 25 landoj, kaj estos 20 oficialaj lingvoj. Sed la lingva aspekto de Eŭropo ankoraŭ ne multe estis pritraktata. Nun riskas aperi disiĝo inter ”etaj lingvoj” kaj ”grandaj lingvoj”? Kio okazos al neoficialaj lingvoj nomataj ”minoritataj”? Kiel eviti la lingvajn hegemoniojn, kiuj jam aperas pro celo je efikeco?

Al ĉiuj kiuj deziras atesti sian intereson por la lingva kaj kultura diverseco de Eŭropo. Al ĉiuj kiuj deziras defendi siajn minacatajn radikojn. Al ĉiuj kiuj proponas la uzon de internacia lingvo neŭtrala Esperanto kiel komunikilo. Al ĉiuj tiuj ni faras ĉi-inviton:

Partoprenu la 9-an de majo 2004 en Strasburgo al la unua manifestacio EŬROPA BUNTO, kiu estos okazo por fari komunan kaj interasocian alvokon favore al justa respekto de la lingva diverseco en Eŭropo.

# Kirjava Eurooppa

Vuonna 2004 EU laajenee. Kielikysymys on ratkaisematta. Se on peitetty muodolliseen monikielisyyteen, joka todellisuudessa suosii vain kolmea suurinta kieltä. Tämä on muutaman, lopulta yhden kielen ylivallan uhka. Se vaarantaa Euroopan kielellisen ja kulttuurisen monimuotoisuuden. Siksi mm. esperantistit kannattavat puolueetonta siltakieltä, joka mahdollistaisi kaikkien kielten tasa-arvoisen kunnioittamisen ja Euroopan demokratian toimivuuden.

Tämän tavoitteen tukemiseksi järjestetään 9. toukokuuta Strasburgissa yhteinen mielenosoitus Euroopan kielellisen kansanvallan puolesta. Kampanjan tarkoituksena on saada aikaan mahdollisimman laajaa keskustelua Euroopan kielioloista. Mielenosoituksen nimi EŬROPA BUNTO merkitsee ”kirjavaa Eurooppaa”. Se kuvaa kielellisen moninaisuuden hilpeää ja juhlavaa puolta. Mielenosoitukseen kutsutaan kaikki, joita Euroopan kieliolot kiinnostavat ja huolettavat.

# Europeiskt kaleidoskop

Under år 2004 ökar antalet EU-länder från 15 till 25 och antalet officiella språk blir 20. Dock är språkfrågan fortfarande olöst. Vi står på gränsen till ett språkligt envälde, till förfång för den språkliga och kulturella diversiteten i Europa. Det är mot denna bakgrund som esperantister, bland andra, stöder bruket av ett gemensamt neutralt hjälpspråk, som är tänkt att möjliggöra lika respekt gentemot alla språk.

Den 9 maj planeras i Strasbourg en demonstration för språklig demokrati. Huvudsyftet är att skapa så mycket debatt som möjligt om språkfrågan i Europa. Kampanjens namn EŬROPA BUNTO betyder “det Europeiska kaleidoskopet”. Det skall bli en färgglad demonstration om språkliga mångfald.

*Por informoj*: Eŭropa Bunto, 6 rue J-P Calloc’h, F-22000 St-Brieuc (FRANCE)
*Tel*: +33 (0)2.96.68.55.21.
*Retadreso*: europa.bunto@eraro.com *TTT-ejo*: http://europa.bunto.free.fr/
*Lähemmin*: Tuomo Grundström *Närmare information*: Carola Antskog

# Kunvojaĝo al la 89a UK en Beijing, Ĉinio

En la mondo estas du plej malfacilaj lingvoj, la ĉina kaj la finna. La ĉina estas la plej malfacila pro siaj malfacilaj ideogramoj kaj la finna – pro sia malfacila gramatiko. Oni diras, ke Ĉinio estas ne alia lando, sed alia mondo. Oni diras ankaŭ, ke Finnlando estas ne parto de kontinento, sed lingva insulo. Do, mi estas tia homo, kiu venis el la alia mondo kaj loĝas en la lingva insulo.

Ok jaroj jam pasis, de kiam mi venis en Finnlandon el Ĉinio. Mi nomiĝas FAN Baiquan. Fan estas mia familia nomo kaj Baiquan estas mia persona nomo. Laŭ la ĉina tradicio la ĉino ĉiam metas sian familian nomon antaŭ sian personan nomon. Mi havas ankaŭ finnan nomon Pekka, kiu estis donita al mi de miaj ekskolegoj en finnaj kompanioj, kie mi programis kiel komputilisto. Mi nun loĝas en Helsinki kaj studas kiel aspiranto al la doktoreco en la Universitato de Helsinki.




***S-rino Irma Heikkilä, s-ro Li Muzhi kaj mi dum la 71a UK, 1986, Beijing (Pekino), Ĉinio.***

Mi esperantiĝis en la jaro 1979, kiam mi estis en la unua jaro de mia studado en Nordorienta Universitato de Teknologio, Shenyang, Ĉinio. Tiam mi interesiĝis pri ĉiaj lingvoj. Iutage hazarde strata afiŝo pri esperanto-kurso vekis mian intereson, kaj mi aliĝis al la kurso. En 1986, mi ĉeestis la 71an Universalan Kongreson de Esperanto en Beijing (Pekino), en kiu mi unuafoje interparolis Esperante kun fremdaj geesperantistoj. En la kongreso mi renkontiĝis kun finna esperantistino s-ino Irma Heikkilä. En 1994, mi ĉeestis la 79an Universalan Kongreson de Esperanto en Seulo, Koreio. Sed mi maltrafis la kongreson en Tampere en la jaro 1995 pro viza prokrasto. Lastan someron mi denove ĉeestis la 88an kongreson en Gotenburgo, Svedio.

Venontan jaron dum la 24a ĝis la 31a de julio, okazos denove UK en Beijing, Ĉinio. La 89a UK estas granda evento ne nur por ĉinaj esperantistoj, sed ankaŭ por esperantistoj el ĉiuj landoj. Estas bona okazo por esperantistoj rekoni Ĉinion, la alian mondon. Dum la 88a UK en Gotenburgo, kelkaj finnaj esperantistoj petis min organizi grupon kunvojaĝi al la 89a UK. Kiel ĉino vivanta en Finnlando, mi kompreneble volonte faras tion, kvankam mi ne havas sperton organizi tian grupon.

Mi jam kontaktis iun turisman servon en Helsinki, kaj eblos al ni aĉeti flugbiletojn grupe (pli ol 10 homoj). La flugservo estas Finnair. La prezo de la turisma servo, kiu estas tre favora, estas neŝanĝebla. La ir-reira bileto kostas ĉirkaŭ 650 eŭroj en somero. Estas kvin flugoj semajne de Helsinki al Beijing, lunde, merkrede, ĵaŭde,



***Fan Baiquan rakontas pri la preparoj de la venontjara Pekina UK kaj pri preparata komuna veturado tien en la oficejo de EAF.***

vendrede kaj dimanĉe, kaj de Beijing al Helsinki, lunde, marde, ĵaŭde, vendrede kaj sabate.

Ni povos ekvojaĝi de Helsinki je la 20:05, ĵaŭde, la 22an de julio, 2004, kaj atingos Beijing je la 8:50, la 23an de julio, 2004. La kongreso inaŭguriĝos la 24an de julio, 2004, kaj finiĝos la 31an de julio. Mi pensas, ke vi ankaŭ povos vojaĝi por almenaŭ unu semajno al aliaj urboj en Ĉinio post la kongreso. Mi proponas, ke vi mendos la postkongresan programon. Kiel grupo ni devas reveni kune al Helsinki. Mi proponas, ke ni revenos de Beijing al Helsinki je la 10:55, sabate, la 7an de aŭgusto, 2004, kaj ni povos atingi Helsinki je la 14:20 la saman tagon.

Mi nun kolektas viajn opiniojn pri nia kunvojaĝo al la 89a UK. Vi povas sendi al mi viajn demandojn retmesaĝe, poŝte aŭ telefone. Bonvolu pli frue sendi al mi viajn nomojn kaj adresojn se vi volas mendi la flugbiletojn, ĉar la servo ne garantias malfruajn flugbileto-mendojn.

Por pli da informoj pri la 89a UK turnu vin al la retpaĝo de El Popola Ĉinio kaj Ĉina Esperanto Ligo (la retpaĝo estas *www.espero.com.cn*).

Kontakto: FAN Baiquan, Retkeilijänkatu 4 A 2, 00980 Helsinki. Tel.: 09-3238496. Retpoŝto: *baiquan.fan@helsinki.fi*

**Aliĝilo**

Mi aliĝas al la Vintraj Tagoj de EAF 13.-14.3. 2004.

Nomo

______________________________

Adreso

______________________________

Tel./Fakso/Retadreso

______________________________

Aliĝkotizo:

- ❑ 12 e ĝis la 15.1.2004 ______
- ❑ 16 e ĝis la 25.2.2004 ______
- ❑ 20 e ekde la 25.2.2004 ______

Duono por FEJO-anoj sub 30 jaroj. Infanoj sub 15 jaroj sen aliĝkotizo kaj personoj loĝantaj ekster Finnlando laŭ interkonsento.

La kunvena paketo **13.-14.3. (tranokto, 2 lunĉoj, 2 kafoj, vespermanĝo)**

- ❑ 62 e dulita ĉambro ______
- ❑ 92 e unulita ĉambro ______
- ❑ 42 e amasloĝejo ______
- ❑ 32 e nur manĝopaketo ______
(2 lunĉoj, 2 kafoj, vespermanĝo)

Entute **pagenda al la konto de EAF** ______

Deziroj koncerne tranokton aŭ manĝojn:

______________________________

______________________________

Bonvolu sendi la aliĝilon al:
Esperanto-Asocio de Finnlando
Siltasaarenkatu 15 C 65, FIN-00530

Pagoj al la konto: Sampo 800017-230825

**BONVENON!**

**Ilmoittautumislomake**

Ilmoittaudun Suomen Esperantoliiton Talvipäiville 13.-14.3.2004.

Nimi

______________________________

Osoite

______________________________

Puh./fax/sähköposti

______________________________

Osallistumismaksu**:**

- ❑ 12 e 15.1.2004 saakka ______
- ❑ 16 e 25.2.2004 saakka ______
- ❑ 20 e 25.2.2004 jälkeen ______

Puoli maksua FEJO:n varsinaisilta jäseniltä. Alle 15-vuotiaat lapset ilman osallistumismaksua ja Suomen ulkopuolella asuvat henkilöt sopimuksen mukaan.

Kokouspaketti **13.-14.3. (majoitus, 2 lounasta, 2 kahvia, iltapala)**

- ❑ 62 e 2 hengen huone ______
- ❑ 92 e 1 hengen huone ______
- ❑ 42 e yhteismajoitus ______
- ❑ 32 e vain ruokapaketti (2 lounasta, 2 kahvia, iltapala) ______

Yhteensä **maksettava EAF:n tilille** ______

Toivomuksia majoituksen tai ruokailun suhteen:

______________________________

______________________________

Lähetä ilmoittautumislomake osoitteella:
Suomen Esperantoliitto ry
Siltasaarenkatu 15 C 65, FIN-00530

Maksut EAF:n tilille: Sampo 800017-230825

**TERVETULOA!**

# Vintraj Tagoj de EAF 2004

## Jyväskylä en la centro de esperantohistorio

**(Jyväskylä keskellä esperantohistoriaa – Jyväskylä i centrum av esperantohistorien)**

**Tempo: la 13a kaj 14a de marto 2004**

**Loko: Jyväskylän kristillinen opisto en la urboparto Kuokkala**

Dum la sekvaj Vintraj Tagoj de EAF en Jyväskylä ni reiros al la pionira epoko de la esperantomovado en Finnlando.

Antaŭ cent jaroj, en 1904, aperis la unua lernolibro de esperanto kaj estis registrita la unua esperantoasocio en nia lando. La asocio estis fondita la antaŭan jaron en Jyväskylä. Ankaŭ alimaniere Jyväskylä ne nur troviĝas en centra Finnlando sed ankaŭ centre de nia historio.

Kiel komenco de Vintraj Tagoj ni konatiĝos kun la laboro de Johan Edvard Leppäkoski (3. 11.1901-5.12.1984), la tradukinto de Kalevala, pere de vizito al la redaktejo de la gazeto Keskisuomalainen kie li laboris. Samtempe ni ankaŭ konatiĝos kun la nuntempa gazeta laboro kaj ĝenerale kun ties historio.

En Jyväskylä okazis someruniversitataj kursoj de esperanto dum 30 jaroj. En 1987 EAF organizis la festadon de la centjariĝo de esperanto ĝuste en Jyväskylä.

### Organizita bustransporto

Ĉe la stacidomoj de Jyväskylä nin atendos aŭtobuso je la 11.00, kiu veturigos nin al Keskisuomalainen. Post la unuhora vizito la aŭtobuso veturigas nin al nia VT-ejo, la kristana instituto, kiu al multaj esperantistoj jam estas konata. Tie nin atendas lunĉo.

Dimanĉe estos jarkunveno matene kaj alia programo posttagmeze. Denove estos bustransporto el la instituto al la stacidomoj ĉ. je la 16a, tiel ke ni atingos la taŭgajn transportilojn.

*Bonvenon!*

# Esperanto en Bilbao

“Bilbao fieras pri unu el la plej malnovaj Esperanto-grupoj de la mondo: fondita en la jaro 1906”, informas Jesus-Miguel Garcia Iturrioz de la Loka Kongresa Komitato. Urbo de tre kompleksa kaj ofte pena historio kaj politiko, Bilbao perdis sian ligon al la Esperanto-movado post la hispana intercivitana milito de 1936 ĝis 1939. “La diktaturo malpermesis Esperanton kaj esperantistoj nur povis renaski ĝin en la jaro 1953. Ekde 1957, ĝia sidejo troviĝas en la malnova kvartalo de Bilbao”.

Bilbao estas urbo en konstanta transformiĝo, kun gastemaj homoj, kiuj optimisme rigardas al la estonteco, sed forte enradikiĝantaj en siaj tradicioj; kun tre riĉa historio rilate la Esperanto-movadon, en loko kie eblas surhaŭte senti la problemojn kaj la riĉecon de dulingveco.

Sub aŭspicio de Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) okazos en Bilbao inter la 25a kaj 29a de aŭgusto 2004, la sesa Eŭropa Esperanto-Kongreso. La kongresa temo estos ’Eŭropa unuiĝo: Esperanto por multlingva mondo’. ”Apud potenca lingvo kiel la hispana, oni parolas ankaŭ la eŭskan, pralingvon de nekonata deveno, nun pluvivanta danke al trafaj zorgoj. Tio enkondukas nian kongresan temon: Eŭropa unuiĝo: Esperanto por multlingva mondo.”

Ekde pli ol dek jaroj okazas Eŭropaj Esperanto-Kongresoj. “En 1992, Verono gastigis la unuan kongreson de eŭropaj esperantistoj. Sekvis aliaj kongresoj, je du- aŭ tri-jaraj intervaloj, organizitaj en Eŭropa Unio”, klarigas la kasisto de EEU, Johan Derks. La dua kongreso okazis en Parizo (Francio) en 1995, la tria en Stutgarto (Germanio) en 1997, la kvara en Ostendo (Belgio) en 2000, kaj la kvina denove en Verono en 2002. “Tiuj kongresoj estas organizitaj de lokaj komitatoj sub la aŭspicio de Eŭropa Esperanto-Unio, la kupola organizaĵo, kiu kunligas la landajn Esperanto-asociojn de la landoj de Eŭropa Unio”.

Ne nur lingva politiko estos en la programo de Bilbao. La kongresa semajno estas plenplena de eŭska muziko kaj lingvo, teatrospektaklo, ekskursoj boate ĝis Portugalio, vizitoj al la Muzeo Guggenheim kaj promenadoj tra Bilbao kaj ĉirkaŭaĵo, pacmuzeo. Eĉ la eŭska parlamento malfermos siajn pordojn por esperantistoj.

Vizitu la Kongresan ttt-ejon:
*http://geocities.com/esperantobilbao*
Retadreso: *esperantobilbao@terra.com*

*Dafydd ap Fergus*

PS. Ĉu vi planas partopreni en la EEU-kongreso? Ni ankoraŭ serĉas reprezentanton de EAF por la oficialaj kunsidoj. En Verono reprezentis nin Carola Antskog. Bv. kontakti la prezidanton de EAF se vi interesiĝas.

## Junulara Fonduso kreskis en la trejnseminario

Dum la projekta trejnseminario ni ebligis al la partoprenantoj donaci monon por Junulara Fonduso. La monkolekto al Junulara fonduso donis 148 eurojn. Koran dankon al ĉiuj donacintoj.

Junulara Fonduso estas mono en la konto de EAF rezervita eksplicite por subteni gejunulojn lerni kaj uzi esperanton. Du personoj, reprezentanto de EAF kaj reprezentanto de FEJO, decidas pri la uzo de la mono laŭ la regularo. Dum kelkaj jaroj JF estis neaktiva ĉar ĝi enhavis tiom malmulte da mono. La reprezentanto de EAF momente estas Anna Ritamäki kaj la vicreprezentanto Päivi Saarinen.

Ĉiam eblas donaci al JF. Bv. pagi al la konto de EAF (trovebla sur p. 2) kun la indiko: Donaco al Junulara Fonduso.

*(amr)*

# Estraro kunvenis

La estraro kunvenis por sia kunsido 7/2003 dum la projekta trejnseminario en Jyväskylä la 4-an 18.30-19.00 kaj 5-an de oktobro 13.30-14.00.

Ĉeestis Anna Ritamäki, Tiina Oittinen, Jukka Noponen, Päivi Saarinen, Markku Saastamoinen, vicestrarano Raita Pyhälä kaj EAF-kasisto Anna-Liisa Heikkinen.

Sub financoj la estraro konstatis plian koston de 243,60 eŭroj sub kursoelspezoj rilate al la somera kurso en Valamo kaj konstatis ke por la venontjara kurso la asocio certigu ke ĉiuj kursokotizoj de eksterlandoj estu pagitaj antaŭ sendo de invitilo.

La estraro decidis, post telefona peto de pliaj informoj, trakti favore kadre de la komunikadprojekta buĝeto la subvencipeton de Esperanto-societo de Oulu por publika jubilea aranĝo planita por la 8an de novembro 2003. Laŭ la decido la prezidanto petu de la societo buĝeton kaj klarigon pri la ligo de la aranĝo al la komunikada projekto. La subvencio kovru realajn kostojn ĝis maksimume la petita sumo de 200 eŭroj. La estraro krome konstatis, ke la Esperanto-societo de Oulu estu oficiale gratulita de EAF. Se ili ne havas la EAF-tablostandardon, la asocio nun donu ĝin. Ebla alia gratulmaniero estas anonco en Sävellahja kun esperantlingva kanto.

EAF aĉetis kopion de la filmo pri IJK 1980 de la ŝtata televido por 109,88 eŭroj per komunikadprojekta mono (vastigo de la oficeja biblioteko).

Kiel kunvenejon por Vintraj Tagoj 13.-14.3. 2004 la estraro elektis post opinisondado dum la trejnseminario la kristanan instituton de Jyväskylä kaj decidis pri la kotizoj.

La estraro nomumis provizoran laborgrupon pri historiaj aferoj: Jukka Laaksonen, Jukka Pietiläinen kaj Mikko Mäkitalo. La prezidanto instigi ilin kunveni kaj EAF kovru iliajn kostojn laŭbezone.

★

La estraro kunvenis por sia kunsido 8/2003 en la oficejo la 15-an de novembro 11.30-15.00.

Ĉeestis Anna Ritamäki, Tiina Oittinen, Jukka Noponen, Päivi Saarinen, Markku Saastamoinen, vicestraranoj Tuomo Grundström, Eero Rinta-Karjanmaa kaj Raita Pyhälä kaj EAF-kasisto Anna-Liisa Heikkinen.

La estraro notis kelkajn financajn aferojn. La finkalkulo de AT en Raŭmo verŝajne montros pozitivan rezulton.

La kostoj por la trejnseminario ĝis la kunsido estis 1683,10 e, sed ankoraŭ mankis iuj malgrandaj kostoj. La kolekto por la Junulara Fonduso dum la trejnseminario rezultis 148 e. La elspezoj por projekto Al kvalita komunikado kiel tuto estis ĝis nun 4082,47 e. La subvencio de Fondumo Esperanto por la unua periodo (ĝis VT 2004) estas 7500 e. Tio signifas ke de la ricevita subvencio restas pli ol 3400 e.

La estraro decidis pagi al Ilkka Santtila 150 e por uzo de la propraj laboriloj dum 2003 kaj laŭ fakturo al la EAF-kasisto 54 e kiel rekompencon de kostoj.

La membrokotizo de EEU por 2004 estas 0,50 e/membro. EAF pagos la kotizon komence de la jaro. Krome EEU rekomendas libervolan aldonan pagon de 0,50 e/membro, sed la estraro de EAF decidis ne pagi la libervolan sumon. Ni eventuale povas konsideri fari pliajn donacojn estonte, kiam ni jam povos taksi la rezulton de la monkolekta kampanjo por la agado de la Brusela Komunikadcentro.

Dum la lingvokurso aranĝita de FEJO en la oficejo, estas uzita interreta konekto tra la telefonlinio de EAF. EAF ne ŝarĝos pri la uzo dum la aŭtuna periodo, sed sekvos la situacion.

La estraro decidis pri la paketprezoj por VT kaj diskutis pri la programo.

Esperantoklubo de Mikkeli (Mikkelin Esperantokerho) post la jaro 1996 ne pagis kotizojn al EAF. La EAF-estraro ĝis nun ne decidis pri eksmembrigo de la klubo kaj ankaŭ elektis mencii la klubon interalie en la jarraportoj kiel membrosocieto, sed nun la estraro konsideris la

situacion de la klubo sufiĉe esplorita por fari decidon.

Elli Husso el Mikkeli informis al la sekretario, ke mikkeli-anoj ne plu intencas revivigi la klubon kaj eble eĉ oficiale malfondos la asocion. Same Marketta Laamanen, kiu gvidas grupon de lernantoj en Mikkeli, dum la trejnseminario diris ke preferindas havi nur neformalan grupon en la urbo. En Yhdistysrekisteri ne estis trovebla iu informo pri la klubo (la EAF-prezidanto informiĝis per la interreta paĝo de la asocia registro). En Mikkeli tamen estas kelkaj aktivuloj, kiuj laŭ eblecoj fariĝos individuaj membroj de EAF kaj de EAF-membrosocietoj. EAF instigas ilin fari tion.

La estraro laŭ la statuto de EAF konstatis la klubon eksmembrigita.

La estraro diskutis pri la projekto Al kvalita komunikado kaj notis ke ĝi estis sukcese lanĉita en la Aŭtunaj Tagoj kaj ke la unua trejnseminario okazis sukcese en Jyväskylä 4.-5.10.2003 kun partopreno de 22 aktivuloj kaj gastiganta preleganto Keijo Tuunanen el OK-opintokeskus. La projekta grupo traktos la rezultojn en la venontaj kunvenoj surbaze de memorando.

Projektaj ideoj de la estraro:

– Pliaj aĉetoj por la EAF-biblioteko de la televido: se eblas la videokasedoj de la programo pri UK '95 kaj la programo Kielten Maailma (sendita en 2001 kaj ree ĉi-jare, unu 10-minuta programo en la serio prezentis esperanton).

– Plia reklamado pri Valamo-kursoj kaj ĝenerale pri lernado de esperanto. Konsiderindas instigi aperigon de noticoj en popularaj magazinoj (ekz. Kodin kuvalehti).

– Ordigo de temaro arkivo, biblioteko, libroservo kaj historio ĝenerale. Povus fondiĝi biblioteka grupo kun spertuloj por analizi la nunan situacion kaj konsili pri la evoluigo de la biblioteko. Tio rilatas ankaŭ al la havigo de novaj libroj kaj la vendo de libroj. Necesus ankaŭ trovi solvojn pri pluraj temoj pri la arkivo, interalie kion forĵeti, kion fordonaci al kiu kaj kiel funkciigi plej bone la ĝeneralan prizorgon kaj ĝisdatigon. La Esperanto-muzeo en Vieno povus doni konsilojn.

La projekta grupo havos kunsidon en januaro.

Mikaelo Bronŝtejn turneos en Finnlando en januaro. La sekretario kontaktiĝis kun Wim Posthuma en Svedio kaj kun diverslokaj kontaktuloj por organizi la turneon. Principe ĉiu gastiganta loko kovras la kostojn ĝis la sekva loko, sed EAF pretas subteni finance la turneon se bezonate, ekzemple pagante la vojaĝon el Stokholmo al Turku.

Michela Lipari, UEA-respondeculo pri Landa Agado petas al la landaj asocioj sendi retadresojn por datumbazo per kiu UEA povas sendi informojn interalie pri servoj. EAF preferas ne sendi tiajn adresojn, sed pretas pluinformi pri ebleco aliĝi al tia datumbazo. Krome ŝi petas komuniki al ŝi kiom da esperantistoj efektive estas en la landoj. EAF konscias ke ekzistas iuj esperantistoj en la lando, kiuj ne estas anoj de EAF, sed ne scias ilian nombron.

EAF gratulos al Oulu-societo okaze de la 25-jariĝo en la radia programo Sävellahja kun la kanto Grava de Esperanto-Desperado (la gratulo estis sendita la 7-an de decembro).

La sekva kunsido estis decidita por la 28.2. 2004 je 11.00 en la oficejo en Helsinki.

La raporton kompilis la prezidanto helpe de la protokolo.

## Kiu estis aktiva aganto en 2003?

La estraro de EAF nomumis ĉiujare ekde 2001 aganton de la pasinta jaro. Por 2000 Riitta Hämäläinen, por 2001 Aini Vääräniemi, por 2002 Tapio Sormunen.

Kiu laŭ vi meritus la titolon Aganto de la jaro 2003? Bv. kontakti iun de la estraranoj kun via propono antaŭ la sekva estrarkunsido (la 28an de februaro en la oficejo). Neoficiala kontakto sufiĉas, sed kompreneble bonaj motivoj helpos nin fari la ĝustan decidon.

*(amr)*

# Societo Nino Runeberg



Societo Nino Runeberg (SNR) estas la finna ekvivalento por Societo Zamenhof de UEA, do ĝi estas la societo de subtenantoj de EAF. La societo estis fondita en la 1980-aj jaroj laŭ la iniciato de Osmo Buller. Por aliĝi la societon oni pagas duoblan jaran kotizon de EAF. La societo honorigas per sia nomo al Hjalmar Johannes "Nino" Runeberg (1874-1934), kiu estis la inicianto de EAF (fondita 1907) kaj ties unua prezidanto kaj honora membro. Li estis ankaŭ la unua finna kongresano partopreninte la unuan UK:n en Bulonjo-sur-Maro 1905. Li estis krome ekz. la iniciatinto de la societo Steleto kaj de la klubo Polusstelo.

Societo Nino Runeberg dormis kelkajn jarojn kaj neniu aliĝis al ĝi. Dum la Vintraj Tagoj de EAF en Mikkeli 2002 ĝi estis revivigata kaj same okazis 2003 dum VT en Lahti. La societo aranĝis en ambaŭ lokoj sabatvespere antaŭ la vespermanĝo akcepton kun ŝaumvino, kiun partoprenis kelkajn aktivajn membrojn de la societo. La tradicio nun daŭrigas dum Vintraj Tagoj en Jyväskylä: la akcepto estos aranĝata tuj antaŭ la vespermanĝo, la ekzakta horo aperos en la programo. Se vi ne ankoraŭ estas ano de la societo, sed volas aparte subteni la agadon de EAF, simple pagu la subtenantan sumon, 36 eŭrojn, al la konto de EAF. Membroj de SNR ne nepre devas esti esperantistoj nek membroj de EAF. Tiel kiu ajn, kiu simpatias la agadon de EAF kaj Esperanto-movadon, povas fariĝi membro. La estraro dankeme bonvenigas ĉiujn aliĝojn.

*La estraro*

Foto: Helsingin Kaupunginmuseon kuva-arkisto / bildarkivo de urba muzeo de Helsinki.

## La Brusela Komunikadcentro pluvivos

Laŭ raporto de la kasisto de EEU Johan Derks nun estas klare ke la Brusela Komunikadcentro (BKC) pluvivos en 2004. Ĝis la kvina de decembro la veto je pluvivo de BKC alportis 29.139 eŭrojn. Tiel venkis BKC kaj la sumoj nun estas pagataj al EEU.

La alvoko de EAF (publikigita en la pasinta numero) alportis entute 1.161 eŭrojn de Finnlando, averaĝe 145 eŭrojn.

Plej multaj homoj partoprenis de Belgio, ok indivuduoj kaj unu grupo. Bonan duan lokon okupas Finnlando kun ok donacantoj. Poste sekvas el la EU-landoj Francio (7), Irlando (6), Italio (5), Hispanio (5), Nederlando (5), Germanio (2), Danlando (1), Portugalio (1) kaj Britio (1).

Krome venis de ne EU-landoj (Norvegio, Svislando, Israelo, Usono kaj Japanio), sume 1.278 eŭrojn. El tiuj landoj la averaĝa grandeco de la donaco estis 183 eŭroj.

Ŝajnas ke la sumoj kalkulitaj kiel 0,5% de la jara salajro varias inter 50 e kaj 200 e. Tamen inter la donacoj estas ankaŭ grandaj sumoj tiel ka la averĝa sumo donacita de EU-landanoj estas 465 e.

Kvankam la veto formale finiĝis la kasisto ankoraŭ akceptas novajn donacojn. BKC ja travivu ankaŭ en la jaro 2005.

*Kompilis Carola Antskog*

## Aatu Moilanen, licenciulo de pedagogia scienco

Post pensiiĝo steletoano Aatu Moilanen rekomencis studi. En marto 2003 lia verko pri evoluo de blindullernejoj en Finnlando 1895-1917 estis aprobita en la universitato de Helsinki. Certe estas rare, ke pensiulo ekkomencas longedaŭran studadon, kies celo estas licenciula ekzameno.

Aatu Moilanen naskiĝis 28.1.1934 en Puolanka. Post blindullernejo en Kuopio li studis en profesia lernejo kaj poste dum laborvivo li kune kun Arvo Karvinen kaj Raimo Tanskanen daŭrigis studadon vespere. Aatu fariĝis kandidato de filozofio en 1968. Lia cefa fako estis pedagogio.

Aatu Moilanen diras, ke studado estas familia entrepreno. Edzino Gunvor asistis lin dum esploro en arkivoj de blindullernejo en Helsinki kaj Kuopio. Ŝia laboro kaj entuziasmo estis neanstataŭigebla helpo. Aatu daŭrigas esploradon ĝis disertaĵo.



***Aatu kaj Gunvor Moilanen.***

Aatu partoprenis blindulan kongreson en Gotenburgo lastsomere.

Ni gratulas kaj deziras al Aatu fortojn kaj sukceson.

*Ritva Sabelli*

## Blindula konferenco en Moskvo

La rusa edukministerio, rusa blindullorganizo VOS kaj kelkaj aliaj lokaj societoj aranĝis en Moskvo 7.-9.10.2003 konferencon pri profesia edukado de viddifektitoj okaze de Eŭropa jaro de handikapuloj. Prelegantoj kaj partoprenantoj estis invitataj pere de malferma invito en internaciaj angla- kaj esperantlingvaj revuoj, dume en brajla Esperanta Ligilo.

Laborlingvoj de la konferenco estis la rusa, angla kaj esperanto. Krom rusaj delegitoj al konferenco venis partoprenantoj el Bulgario 2, Moldavio 1, Romanio 1, Finnlando 1 kaj Ukrajnio 3, entute 138 partoprenantoj.

Arvo Karvinen prelegis esperante pri perspektivoj de speciala profesia edukado en Finnlando. Lian paroladon interpretis Anatolij Masenko, konata personeco en esperantomovado de vidhandikapitoj.

*Ritva Sabelli*

## Alvoko – Kutsu – Kallelse

La laŭstatuta jarkunveno de Esperanto-Asocio de Finnlando okazos dimanĉon, la 14an de marto, 2004 je la 10a horo en Jyväskylän kristillinen opisto (Kristana instituto de Jyväskylä) Sulkulantie 28, Jyväskylä. En la kunveno estos traktitaj la laŭstatutaj jarkunvenaj aferoj.

Esperanto-Asocio de Finnlando – Suomen Esperantoliitto ry:n sääntömääräinen vuosikokous pidetään sunnuntaina 14.3.2004 klo 10.00 alkaen Jyväskylän kristillisellä opistolla, Sulkulantie 28, Jyväskylä. Kokouksessa käsitellään liiton sääntömääräiset vuosikokousasiat.

Finlands Esperantoförbunds stadgeenliga årsmöte hålles söndagen den 14.3.2004 kl. 10.00 i Jyväskylän kristillinen opisto, Sulkulantie 28, Jyväskylä. Mötet behandlar de i förbundets stadga föreskrivna årsmötesärendena.

*La estraro – Hallitus – Styrelsen*

# Ilmainen alkeiskurssi




Suomen nuorten esperantoliitto FEJO on vastannut haasteeseen järjestää esperanton alkeisopetusta Helsingissä. Opetusta saavat kaikki halukkaat ikään katsomatta tiistaisin klo 19-20 EAF:n toimistolla os. Siltasaarenk. 15 C 65. Ensimmäinen oppitunti pidettiin jo syyskuun puolella, mutta kurssille voi hypätä mukaan milloin vain: joka tunnilla opetellaan kommunikointia ja sanastoa sekä jokin uusi kielioppiaihe. Lisätietoja saa nettiosoitteesta *<www.esperanto.fi/fejo/kurssi.htm>* – tiedustelut kurssin vastaavalta tuntiopettaja Patrik Austinilta os. *<fejo@esperanto.fi>*.

**!!!!OSTAOSTAOSTAOSTAOSTAOSTAOSTAOSTAOSTAOSTAOSTAOSTA!!!!**

*Uusi vuosi, uudet levyt...*
On taas monta syytä turvautua
**FEJO:n Diskejon** palveluksiin!

Saimme täydennystä varastoomme.
Tarjolla on mm.


– *Elektronika Kompilo*, uutuus jolla mukana myös Dolcxamar!
– Esperanto Desperado: *Brokantaĵoj*
– *Jacques Yvart kantas Georges Brassens*
– Ĵomart kaj Nataŝa: *Valso por amikoj*
– Kaj tiel plu: *Sojle de la klara temp*
– Merlin: *Ho! Mia kor'!* ja *Por la mondo*
– Persone: *Povus esti simple*, *Sed estas ne* ja *Sen*

Käy tutustumassa levyihin ja artisteihin osoitteissa *www.esperanto.fi/fejo/diskejo* sekä *www.vinilkosmo.com*

KÄTEISELLÄ levyn hinta on 17 euroa. Voit piipahtaa ostoksille tiistaisin klo 17-19 osoitteeseen Siltasaarenkatu 15 C 65, Helsinki.

POSTITSE voit tilata levyn hintaan 18,50 euroa. Toimi näin:

1) maksa tilauksesi FEJO:n tilille 101130-227446
2) lähetä tilauksesi, yhteystietosi ja tieto maksusta Katjalle: *katja.lampinen@edu.stadia.fi*, 040 523 6076
3) odota kieli pitkällä pakettia, joka postitetaan kahden viikon kuluessa tilauksestasi



## Ĉu Italio interesas?

Ĉiujare du membroj de FEJO havas eblon partopreni la Internacian Junularan Festivalon en Italio per pago de la edukministrejo. Ĝi estos venontjare 7.-13.4. Vidu informojn en la interreto: <*http://iej.esperanto.it/iej/ijf/*>

Se vi volas kandidatiĝi por partopreno, informu pri tio al sekretario de FEJO ĝis fino de januaro. En prioritato estas ordinaraj membroj de FEJO (sub 30-jaraj), kiuj antaŭe ne partoprenis ĉi tiun vojaĝon. Se ni ne havos tiajn kandidatojn, ankaŭ aliaj taŭgas. Artikoloj pri antaŭjaraj spertoj de la vojaĝoj estas almenaŭ en EF numeroj 3/02 kaj 3/03.

## Kiinnostaako Italia?

Joka vuosi kaksi FEJOn jäsentä pääsee Italiaan IJF:ään opetusministeriön kustannuksella. Ilmoittaudu hakijaksi FEJOn sihteerille tammikuun loppuun mennessä. Etusijalla ovat FEJOn varsinaiset jäsenet, jotka eivät ole aiemmin olleet kyseisellä matkalla, ja esperantoa olisi osattava sen verran, että selviytyy itsenäisesti.

Sekretario de FEJO / FEJOn sihteeri Mikko Mäkitalo, tel./puh. (02) 2373 848, <*makimik@hotmail.com*>

## Fondiĝis EsperHe

La 21-an de novembro 2003 fondiĝis nova esperantoklubo Esperanto en Universitato de Helsinko (EsperHe).


La estraro konsistas el: Terho Uotila, prezidanto; Patrik Austin, sekretario; Lasse Rantanen, vicprezidanto; Riitta Hämäläinen, membro de la estraro kaj Tuukka Liukkonen, vicmembro.

La ĉefaj celoj de la asocio estos starigi kaj promocii eo-kurson en la universitato kaj agi kiel ligilo inter diverslandaj eo-studentoj kaj universitatoj. EsperHe petos submembrecon de FEJO kaj registriĝon en HYY (Helsingin yliopiston ylioppilaskunta).


*Patrik Austin*

# Pratempaj amuzoj


Uusi sarja jatkuu! Hupia ja hyviä muistoja menneiltä FEJO-vuosilta. koonnut: Katja Lampinen




FEJO-bulteno 5/88




Kvinpinto 4/1986





Kvinpinto 4/1986

# Sur la nokta ĉielo

## Galopanta mita besto

Kelkaj konstelacioj klare similas la realan aferon, laŭ kiu ili estas nomataj, aliaj tute ne. Ie inter la ekstremaj kazoj estas nia ĉi foje traktata konstelacio, Pegasus. Ĝia nomdoninta estaĵo, pegazo, estas flugilhava ĉevalo en antikva mitologio. Por vidi tian figuron sur la ĉielo indas tamen rigardi kune la najbarajn konstelaciojn Pegasus kaj Andromeda. Ilia kuna figuro estas inter konstelacioj unu de la plej grandaj, sed ne tre rimarkiga, ĉar ĝi ne havas tre brilajn stelojn.

La korpon de la pegazo formas la tn. kvadrato de Pegasus (*Pegasuksen neliö*), kvar preskaŭ egalbrilaj steloj en preskaŭ kvadrata formo. Vico de steloj supre maldekstre formas kolon kaj kapon, aliaj vicoj supre dekstre voston kaj flugilojn. Postaj gamboj etendiĝas malsupre dekstre kaj antaŭaj gamboj estas kurbitaj ĉe la malsupra maldekstra stelo de la kvadrato. Tiel oni povas vidi la figuron de galopanta pegazo, kiu dum decembraj fruvesperoj estas alte sude.




***Pegasus estas en decembraj fruvesperoj proksimume je 18 en suda direkto. La planedo Marso estis 23.12. en la situo montrata en la bildo. Pli frue decembre Marso estis pli dekstre, dum fino de decembro kaj dum januaro pli maldekstre.***

Dum tiu ĉi vintro Pegasus estos facile trovebla helpe de Marso, kiu ankoraŭ estas unu de la plej brilaj objektoj sur la nokta ĉielo kaj nun rekte sub la kvadrato de Pegasus. La 23-an de decembro Marso koincidas kun la maldekstra flanko de la kvadrato, kiel apuda bildo montras. Pli frue decembre Marso estos rekte sub la kvadrato, dum vintro moviĝante maldekstren.

## Ĉu iu vivas... ie tie?

Jam ekde la 19-a jarcento astronomoj sciis ekzisti steloj, kiujn ĉirkaŭiras alia stelo. Kial do ne ankaŭ ekzistus planedoj ĉirkaŭ aliaj steloj ol nur la Suno? Dum la 20-a jarcento estis trovitaj pli kaj pli kazoj, ke iun stelon ĉirkaŭiras malpli granda astro. Oni nur devis longe atendi la novaĵon pri tia ĉirkaŭiranta astro en la sama grandeco kun la planedoj ĉirkaŭ la Suno.

Estas fakte ne tute klara distingo, kio estas planedo kaj kio stelo. Astrofizikaj teorioj tamen rakontas, ke se maso de astro (*taivaankappaleen massa*) estas malpli ol 1000-ono de maso de la Suno, ĝi ne produktas energion, kiu radius eksteren. Do tiu 1000-ono de maso de la Suno taŭgas por esti difinanta limo inter stelo kaj planedo. Jupitero estas preskaŭ precize ĉe tiu ĉi limo.

Longe atendata novaĵo venis oktobre 1995. Oni pruvis ekziston de planedo apud stelo 51 Pegasi. Tiu stelo en bonaj cirkonstancoj videblas nudokule tuj dekstraflanke apud mezpunkto inter la du dekstraj steloj de la kvadrato de Pegasus. Tie do estis konata la unua planedo ekster la Sunsistemo. Tia planedo nomiĝas eksoplanedo (*eksoplaneetta*). La planedo ne videblas eĉ

# Esperanto-maailmastani

## Rahat pois valkonaamoilta

Tämän tästä lehdistössä on kierrellyt juttuja, joissa afrikkalaiset rikolliset huijaavat rahaa eurooppalaisilta valkonaamoilta. Se että petokset joskus onnistuvat, perustuu ihmisen luontaiseen ahneuteen: luvataan mahdollisuus ansaita todella paljon rahaa. Myös Esperantomaailmaan on ilmaantunut näitä rahantarvitsijoita. Toista vuotta sitten eräs kerholaisemme sai netin kautta esperantoksi kirjeen, jossa esitetään uskomaton tarina. Kirjeen allekirjoittajaksi mainitaan Masasi Sivu Mosa. Vakuudeksi mainitaan, että allekirjoittaja on Kansainvälisen Esperantoliiton edustaja (delegito) omassa kaupungissaan Kongossa sekä neuvotaan miltä sivulta UEA:n vuosikirjasta tiedot voi tarkistaa. Ja sieltä ne löytyvätkin, myös 2003 vuosikirjasta.

Roimasti tiivistettynä tarina on tämä: Kapinallinen Lauret Kabila kukisti Kongon presidentin Mobutu Sesekon (toukokuussa 1997), joka oli kirjeen kirjoittajan setä. Syrjäytetty presidentti pakeni Marokkoon, jonne sitten kuolikin järkytyksen vuoksi. Uusi hallitsija takavarikoi entisen presidentin omaisuutta, kuten firman Lasco Merchant Comoany Limited. Nyt kuitenkin kävi niin onnellisesti, että firman varoja onnistuttiin pelastamaan 83 500 000 US-dollaria! Ne pakattiin tiiviisti suureen matkalaukkuun, joka onnistuttiin kuljettamaan diplomaattiteitse Beniniin. Kirjoittaja, siis Masasi Sivu Mosa, pakeni perheineen Etelä-Afrikkaan itse Nelson Mandelan avulla.

Ystävällismielisen esperantistin apua tarvittiin siten, että hän kantaisi laukun maasta pois omana matkatavaranaan. Ei enempää eikä vähempää! Todistuksen omistuksesta kirjoittaisi asianajaja herra Tombo (nimi viitteellinen?), joka on kuulemma Kamerunin kansalainen. Näin homma onnistuisi turvallisesti tullissa. Firman johtokunta on päättänyt, että 70% edellä mainitusta summasta kuuluu edesmenneen presidentin omaisille. Tästä summasta 30% saa avulias esperantisti. Siis 17 535 000 USA:n dollaria. Lisäksi häneltä pyydetään vihjeitä, mihin maahan loppurahoilla perustettaisiin uusi firma Afrikan ulkopuolelle.

Kerholaisemme ilmoitti ettei asia kiinnosta. Pian tuli vastaus, että olisi olemassa toinenkin tie, jonka mukaan ei välttämättä tarvitsisikaan matkustaa Beniniin. Asian voisi hoitaa myös siten, että he lähettäisivät postissa matkalaukun Suomeen. Tarvitsisi vain vastaanottaa laukku postissa, ja pian olisi 17 535 000 dollaria rikkaampi. Tämäkään ylenpalttisen helppo tapa ei kiinnostanut, ja asia kuivui siihen.

Tiedetään että tällaisissa huijausyrityksissä kaava on sama. Ennen kuin se rahaa pullollaan oleva matkalaukku olisi ollut postissa Lahdessa, olisi uhrilta pyydetty tietty summa lainaksi tiettyjen menojen peittämiseen. Tämän jälkeen laukku olisi jo viittä vaille lähdössä mutta olikin ilmaantunut uusi yllättävä rahanmeno, pitäisi siis vielä maksaa jne, jne.

---

per la plej grandaj teleskopoj. Oni povas trovi eksoplanedojn per mezurado de la lumo de steloj. Ekzisto de planedo kaŭzas moviĝojn de la stelo kaj tiel variadon en ĝia lumo.

Dum la pasintaj ok jaroj astronomoj rapide trovis pliajn eksoplanedojn tiel, ke 51 Pegasi estas ne plu eksterordinaraĵo. Jare 2002 estis jam 78 eksoplanedoj konataj, kaj ĉi jare fariĝis estimo, ke kvin procentoj de steloj havas planedojn. Sed la trovo de unua eksoplanedo garantias, ke 51 Pegasi restas en la historio de scienco.

51 Pegasi estas proksimume samgranda stelo kun la Suno. Eble ĝi havas eĉ plurajn planedojn, kaj eble sur iu de ili ekzistas eĉ taŭgaj kondiĉoj por vivo. Eble iu intelekta estaĵo tie konstatis, ke planedoj ekzistas ankaŭ ĉirkaŭ aliaj steloj, rigardas al nia direkto kaj cerbumas, ĉu ekzistas ankaŭ intelekta vivo aliloke.

*Mikko Mäkitalo*

Tulee mieleen, että pitäisiköhän UEA:n tarkistaa omien edustajiensa toimintoja?

(Sulkeissa olevat tekstit allekirjoittaneen.)

★


### UEA kaaoksessa?

UEA:sta puheen ollen. Suuri joukko sen keskustoimistossa työskennelleitä henkilöitä sanoi itsensä irti lähes samanaikaisesti. Ensimmäinen lähtenyt oli toimistonjohtaja suomalainen Osmo Buller. Kuulemma syynä oli erimielisyydet UEA:n hallituksen kanssa. Jos tarkoituksena oli antaa tuntuva isku esperanton maailmanjärjestölle, se totisesti onnistui. Keskustoimisto Hollannin Rotterdamissa on nyt kaaoksessa.

Tavallinen jäsen, jolla ei ole internettiä, ei näistä vaikeuksista paljon tiedäkään, mutta jotain todistusta sentään kertyy. Kuittausta vastaan sain Göteborgin kongressissa UEA:n vuosikirjan. Siitä huolimatta kotiin tuli vielä toinen samanlainen. Mitä merkitystä sillä kuittauksella oli? Toinen esimerkki. Koska en saanut huonetta tilaamastani hotellista, jouduin ottamaan kalliimman. Maksoin erotuksen 126 euroa kongressin tiskillä ja sain pienen kuitin. Muistan tapahtuman hyvin, kuittivihko oli sellainen, että se jätti peräti kaksi jäljennöstä maksun saajalle. Nyt UEA perii samaa maksua toiseen kertaan! Jos näin yksinkertainen asia on epäselvä, niin mitä kaikkea muhiikaan keskustoimiston pöydillä. Nyt minun pitäisi löytää papereitteni joukosta tuo pieni kuitti. Todennäköisesti se jostakin löytyykin.

*Esa Lång*

---



## Turneo de rusa bardo Mikaelo Bronŝtein

Konfirmiĝis, ke la konata rusa bardo kaj prelegisto Mikaelo Bronŝtein venos post la jubilea IF en Kiel tra Svedio ankaŭ en Finnlando. EAF kaj la lokaj esperanto-kluboj kaj -grupoj en Finnlando invitis lin fari turneon ankaŭ en nia lando. Laŭ la nuna scio li alvenos al Turku la 20an de januaro 2004 kaj vizitos krom Turku verŝajne ankaŭ la sekvajn lokojn: Raŭmo, Keuruu/Jyväskylä, Tampere, Kimito (Kemiö), Helsinki, Lahti kaj Lappeenranta. En la programo estos planitaj prelegetoj kaj vizitoj ĉe lokaj esperantokursoj kaj ĉe kelkaj lernejoj aŭ institutoj, kie la funkciado de la internacia lingvo povas esti prezentita ankaŭ al aliaj ol esperantistoj. Vi lokaj kontaktuloj certe informos vin pri la aranĝoj kaj pliaj informoj aperos ankaŭ en la retlisto EAF-agadas. Bonvenon Mikaelo!

*Tiina Oittinen, sekretario de EAF*


## Abonoj por la jaro 2004

***Heroldo*** *32 eŭroj*

***Literatura Foiro*** *30 eŭroj*

*Pagoj al Sampo-banko*
*konto 800017-70845965*

*Literatura Foiro – koop*
*PL 87*
*00531 HELSINKI*

# Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

**Muutokset ja lisäykset osoitteistoon: Ilkka Santtila, Mannerheimintie 40 D 86, 00100 Helsinki, s-posti *ilkka.santtila@esperanto.fi* mieluummin kirjallisena.**

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. Sakari Kauppinen, sakari@skau.pp.fi
- Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi
- Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Seija ja Kari Kettunen), Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ (014) 254 609 kari.kettunen@pp1.inet.fi
- Lahden Esperantokerho / Esperantoklubo de Lahti, (Martti Pennanen) Kalliomaankatu 10, 15150 Lahti. martti.pennanen@pp.phnet.fi
- Oulun Esperantoseura / Esperantosocieto de Oulu, (Allan Mehtonen) Valtatie 6-8 B 15, 90500 Oulu
- Salon Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla matti.wallius@pp.inet.fi
- Esperantoseura Antaŭen ry. / Esperantosocieto Antaŭen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. (Lauri Liukkonen, Varstatie 37, 37500 Lempäälä, lauri.liukkonen@jippii.fi)
- Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku, (Tiina Oittinen) Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. tiina.oittinen@pp.inet.fi

- Suomen opettajien esperantoliitto / Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj, (Carola Antskog) Dragsfjärdsvägen 690, 25700 Kimito. cantskog@kolumbus.fi. Tilinro: 800015-129185
- Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. fejo@esperanto.fi. Tilinro: 101130-227446
- Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. (09) 660 651

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset hoitavat jäsenmaksut liittoon. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu v. 2003 on 18 e sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 36 e. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lappeenrannassa toimii aktiivinen esperanton harrastajien ryhmä, jolle voi lähettää postia osoitteeseen (Irja Miettinen) Esperantogrupo de Lappeenranta, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta.

Useiden paikkakuntien puhelinluettelosta hakusanan “Esperanto” kohdalta löytyy paikallisten harrastajien puhelinnumeroita. Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa myös Suomen Esperantoliitolta, aktiivisia harrastajia on mm. Mikkelissä, Raumalla, Hämeenlinnassa ja Taivalkoskella.

## Esperantolehti

**ilmestyy vuonna / aperas dum la jaro 2004**

| Nro | Red.grupo komencas | Limdato | Aperas |
|---|---|---|---|
| 1 | 1.1 | 15.1 | 1.2 |
| 2 | 1.3 | 15.3 | 1.4 |
| 3 | 1.5 | 15.5 | 1.6 |
| 4 | 1.7 | 15.7 | 1.8 |
| 5 | 1.9 | 15.9 | 1.10 |
| 6 | 1.11 | 15.11 | 1.12 |

Avustajien toivotaan noudattavan edellä esitettyjä aikoja. La redakcio esperas, ke helpantoj atentu la datojn supre.

### Ilmoitushinnat ◆ Anoncprezoj

| Ulkopuoliset mainostajat / Ekster membraro: | Jäsenet / Membroj: |
|---|---|
| 1/1 sivu/paĝo 100 e | 1/1 sivu/paĝo 50 e |
| 1/2 sivua/paĝo 60 e | 1/2 sivua/paĝo 30 e |
| 1/4 sivua/paĝo 40 e | 1/4 sivua/paĝo 20 e |

------------------



Palautusosoite: Esperantoliitto
Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki



***Infangrupo de Metsäkylä, Taivalkoski ĉe la Aŭtunaj Tagoj: "Dilemo de Miriapodo".*** *(Foto: Pentti Makkonen)*

## Seuraava numero ◆ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy helmikuun alussa. Jutut 15.1.2004 mennessä EAF:n toimistoon. Venonta numero aperos en la komenco de februaro. Artikoloj ĝis 15.1.2004 al la oficejo de EAF. Osoite/adreso: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, puh/tel. (09) 715 538, s-posti/rete: <*eaflehti@esperanto.fi*>.

**Pica-Paino Oy, Jyväskylä 2003**